

Bulgara **ESPERANTISTO**



E N H A V O

* * *	Al la popoloj — pacon kaj sekurecon!	1
* * *	Jubilea Literatura Konkurso	2
* * *	Grava sciigo	2
	Dolmatovskij. Kanto pri la paco	3
	Ilija Kolev. La gvardiulo	3
	Maria Diĉeva. Bonaj sukcesoj de la E-instruado en Smoljan-distrikto	5
	Canko Murgin. Bona E-kunveno en Ŝumen	6
	E. D. Infanoj eklernis Esperanton	6
	Rajna Konstantinova. 70 jarojn „Roza Valo“	7
	Radenko Iliev. En E-societo „Progreso“	7
	B. K. Esperanta laborbrigado	7
	Andrej Pânĉev. Iam kaj nun	9
	L. Leviĉarov. El la agado de la klubo de esperantistoj- filatelistoj en Sofio	9
	Ivan Sarafov. Ivan Vladkov	10
	G. D. Komuna bulgara-hungara aranĝo	11
	T. K. Vesperto pri la Septembra Ribelo en Moskvo	12
	T. Kulagin. La esperantistoj-delegitoj de la Moskva packon- greso gastis en MIEK	12
	Kimiaki Kurita. Kun diverslandaj amikoj	12
	R. Imbert. Kiel naskiĝis PIF	13
* * *	„Intergast“ — loĝiga servo de Monda Turismo	14
* * *	Internacia konkurso por pretigo de E-propagandiloj	15
	Branimir K. Vălev. Mi partoprenis la 13-an infankongreseton	16
	Hella Sauerbrey. Letero	III
* * *	Tra la gazetaro	III
* * *	Deziras korespondi	IV

Sur la kovrilpaĝo:

La internacia Esperanto-kursejo en Pisanica —
distrikto de Smoljan

*Abonkotizo: jara—1,40 levoj. Por eksterlando—3,44 lv., 5 rubloj, 2,50 dola-
roj aŭ egalvaloro. Por Albanio, ĈSSR, Hungario, Jugoslavio, Pollando, Ru-
manio, GDR, Sovetunio — 2 lv., 2,50 rubloj, 1 dolaro aŭ egalvaloro. Aparta nu-
mero — 0,14 lv.*

*Reklamtarifo: 0,15 lv. por sm²; sur tuta kovrilpaĝo — 80 lv.; korespond-
anoncoj: 5 stotinkoj por ĉiu vorto; eksterlandaj adresoj — publikigataj senpage.*

EKSTERLANDAJ PERANTOJ DE „BULGARA ESPERANTISTO“

(Pliaj perantoj el diversaj landoj estas serĉataj)

ITALIO: Julia Franceschi, str. Carducci
32, Padova.

KOREO: Korea Esp. Asocio, Pieng' jang
P. O. kesto 16.

NEDERLANDO: Ru Bossong, Floraplein 23
Eindhoven.

RUMANIO: Mihail Popescu, P. O. Box 205,
Bucuresti 1.

SOVET-UNIO: Ivan Palkin, ul. Ŝvernika,
D. 7, kor. 3, kv. 44, 117 449 Moskva
V-449.

SVEDIO: Karl Krist, Deje, Box 109.

**AL LA POPOLOJ — PACON KAJ SEKURECON!**

Milionoj da homoj sur la planedo direktis siajn okulojn al la Tutmonda Kongreso de Pacamaj Fortoj, kiu kunsidis en Moskvo de la 25 ĝis 31 de oktobro 1973. De ĝia tribuno estis aŭdebla la potenca voĉo de vera asembleo de la popoloj defende al la paco kaj sekureco por la tuta homaro. La Kongreso alvokis al batalo por plua malstreĉo de la internacia tensio, por interhelpo kaj kunlaborado, por unuiĝo de ĉiuj fortoj, luktantaj kontraŭ la imperiismo, reakcio kaj milito.

Neniam ĝis nun en la historio de la homaro okazis internacia pacforumo kun similaj dimensioj, kolektinta tiom multe da reprezentantoj de pacfortoj kiel la Kongreso en Moskvo en 1973. Ĝin partoprenis ĉirkaŭ 3200 delegitoj el 143 landoj. Ili alportis la postulojn de pli ol 1100 landaj kaj internaciaj organizaĵoj — postulojn pri unuiĝo de sociaj organizaĵoj kaj movadoj kun tute malsamaj politikaj konceptoj. Tio montras la larĝan socian bazon, sur kiu aktivas la nobla movado de la pacamaj fortoj.

La Kongreso fundamente esploris multajn gravajn problemojn, ligitajn kun la lukto por justa demokratia paco, por sekureco kaj internacia kunlaborado. Tio estas la problemoj pri malpliigo de la internacia tensio kaj la armado, pri la paca konekzistado kaj kunlaborado en diversaj sferoj, pri la batalo kontraŭ koloniismo kaj rasismo, por nacia liberiĝo kaj progreso. La libera interŝanĝo de opinioj en la plenkunsidoj kaj en la dekkvar komisionoj rezultigis la ellaboron de komuna pozicio, aprobon de klara kaj konkreta agadprogramo, kiu estas esprimita en la kongresdokumentoj.

Por popularigo de la ideo pri kunvoko de la tutmonda Kongreso de Pacamaj Fortoj donis sian kontribuon ankaŭ la esperantistaro. (Informojn pri esperantistaj packunvenoj enkadre de la UK en Beogrado kaj en nia lando „Bulgara Esperantisto“ donis en siaj n-roj 7-8 kaj 9/1973).

En la Kongreso ĉeestis aŭtoritata delegitaro de MEM, konsistanta el respondecaj personoj, kiuj partoprenis aktive en la kongreslaboroj. Dividitaj en diversaj komisionoj, ili regule sekvis la laboron, ĉiam en la spirito de komprenemo kaj kunlaborado. Krome, esperantistoj partoprenis en apartaj landaj delegitaroj (Svislando, Svedio, Jugoslavio, Hungario). Dum la streĉa kongresa laboro estis trovita „fenestreto“ por speciala renkontiĝo kun la prezidento de la Kongreso kaj ĝenerala sekretario de Tutmonda Packonsilio s-ro Romeş Căndra (Romesh Chandra). Unue la delegitaro de MEM prezentis al s-ro Căndra la honorinsignon kun diplomo, aljuĝitajn al li de la Beograda Ĝenerala Konferenco de MEM lige kun la 20-jara MEM-jubileo. Kortuŝita s-ro Căndra dankis al la delegitaro pri tiu honorigo. Poste oni trak-



tiis aferece du dokumentojn pri komuna paclaboro; deklaron kaj programon el praktikaj taskoj, plenumendaj de la Tutmonda Packonsilio kaj MEM.

Videble, la laboro de la esperantistaro sur la fronto de la pacbatalo estas fruktodona. Tamen, nia specifa kontribuo povus esti pli reprezenta kaj efika, se pliaj landaj kaj internaciaj E-organizaĵoj eklaboros tiudirekte.

La aktiva partopreno de la popolamasoj, ties organizaĵoj, politikaj partioj, sindikatoj ktp. ĉe solvado de la problemoj de paco kaj milito — tio estas unu el la plej gravaj faktoroj en la evoluo de la aktuala internacia situacio. La pacamantaro devas formi larĝan fronton por atingi de la plej grava celo: ke la malpliigo de la streĉeco en la internaciaj rilatoj fariĝu fenomeno solida, fortika, konstanta.

La Tutmonda Kongreso de la Pacamaj Fortoj estas elstara evento kun grandega internacia signifo. Tute ĝuste oni ĝin nomis „unua ĝenerala asembleo de la popoloj en la mondo“. La kongreso faris gravegan kontribuon al la plua interkompreniĝo kaj kunlaborado, aktivigis kaj unuigis de la pacamaj fortoj.

Estas memorindaj la vortoj de Leonid Breĵnev el lia brilanta laŭ formo kaj programeca laŭ enhavo parolado, farita antaŭ la kongresanoj: „La postulo de la aktuala politika momento aŭ, se vi volus, la postulo de la epoko — tio estas la unuigo de ĉiuj pacamaj fortoj de la homaro, por esti garantiita la paca evoluo de ĉiuj popoloj.“

JUBILEA LITERATURA KONKURSO

Dedice al la glora 30-a jubileo de la socialisma revolucio en nia lando (9. IX. 1944 j.) la redakcio de „Bulgara Esperantisto“ anoncas grandan literaturan konkurson.

PARTOPRENI POVAS ĉiu bulgara aŭ eksterlanda esperantisto. La nombro de la verkoj, originalaj kaj tradukitaj (rakontoj, eseoj kaj versaĵoj) ne estas limigita.

LIMTEMPO por prezenti la konkursojn: 15 de junio 1974 j.

Speciala jurio priĵugos kaj premios la plej bonajn verkojn. Kelkaj el ili aperos en „Bulgara Esperantisto“.

La konkurso estas sekreta. La maŝine aŭ mane (sed sufiĉe legeble!) skribitaj materialoj devas esti subskribitaj per pseŭdonimo. La saman pseŭdonimon oni skribu ankaŭ sur fermitan koverton, en kiun anticipe oni metu slipe-ton kun la vera nomo de la aŭtoro, kaj la fermitan koverton oni metu en pli grandan koverton, ankaŭ subskribitan per la sama pseŭdonimo, kaj sendu ĉion rekomendite al adreso: „BULGARA ESPERANTISTO“, BULV. HRISTO BOTEV 97, SOFIO (POR LA KONKURSO).

Gekamaradoj, amase partoprenu nian Jubilean Literaturan Konkurson!

GRAVA SCIIGO!

Karaj abonintoj,

La presejo, kie estas ellaborata „Bulgara Esperantisto“, pro presado de lernolibroj por la lernejoj ege malfruigis kelkdekojn da periodaĵoj, inter kiuj ankaŭ la nian.

Pridiskutinte tiun tro malagrablan situacion kaj atentante la proponojn de multaj abonintoj, la Estraro de CK de BEA kaj la redakcio de „Bulgara Esperantisto“ entreprenas gravan paŝon: 1973 jaro finiĝu per 10 numeroj; n-roj 1 kaj 2 de 1974 aperu kune; se estos necese ni eldonu ankoraŭ kelkajn duoblajn numerojn, sed ni atingu regulecon en la aperado de la revuo.

Kredante, ke la abonintoj de „Bulgara Esperantisto“ por 1973 j. komprenos tiun ĉi malagrablan paŝon, ni sincere petas ilian pardonon!

La redakcio penos rekompenci iamaniere la abonintojn.

CK de BEA
La redakcio de „BE“



Poezio kaj belletro

KANTO PRI LA PACO

Muziko: D. Šostakovič

Flirtas flagoj de paco triumfe en vent',
ilin farbis per sang' batalintoj.
Ja forpelis faŝismon impeta torent',
sed insiste avertas batalintoj:

Gardu! La paco de la mond'
estas de l'sorto ne donac'.
Forta en ĉirkaŭmonda front',
venkos militon la pac'.

Ne rezignas faŝistoj per krima milit'
eternigi la imperiismon.
Sed jam pasis la temp' de sordida¹ insid',
ĉiuj vojoj nun celas komunismon.

Tamen — la paco de la mond'
estas de l'sorto ne donac'.

¹ sordida=malpura (PIV)

Forta en ĉirkaŭmonda front',
venkos militon la pac'.

Sur la grenkampoj kreskas sufiĉe da pan',
laboruloj riĉecon produktas.
Povas vivi feliĉe jam ĉiu teran',
se l'popoloj per paca vivo luktas.

Agu! La paco de la mond'
estas de l'sorto ne donac'.
Forta en ĉirkaŭmonda front',
venkos militon la pac'.

Vortoj laŭ ideoj de Dolmatovskij
esperantigitaj de R. Rabenhalt
(el „Paco“ n-ro 4/1973)

LA GWARDIULO*

de Ilija Koler

Vi deziras, kamarado, ke mi rakontu,
kiel mi fariĝis kaŝanto de partizanoj,
por ke vi skribu en la ĵurnalo. Tiu ĉi
afero por mi estas iom malfacila, sed
mi provos. . .

La vintro de 1944 jaro en nia lando
estis tre malvarma, tial hejme ni finis
la brullignon. Estis multaj partizanoj
kaj neniu havis rajton iri en la arbaron
sen permeso. Bone, sed ĉu oni
povas vivi vintre sen brulligno?

Kaj malgraŭ ĉio iun matenon mi al-
venis kun la bovoveturilo en „Popov
Djal“. Mi maljungis la bovojn, donis
al ili fojnon, prenis la hakilon kaj ek-
iris. Ĝuste en tiu ĉi momento antaŭ mi
ekstaris du partizanoj kun aŭtomatpa-
filoj en la manoj. La pli aĝa estis alta,
svelta, kun cikatro sur la vango, la

alia — malalta, dika.

— Kiu vi estas? — demandis min
la pli aĝa.

— Nikolao Petrov, tamen oni min
nomas La Gvardiulo.

— Ĉu en la gvardio vi servis?

— Ne, sed pasintjare okazis kverelo
inter mi kaj mia samvilagano Ivan la
Flikaĵo, kaj li donis al mi tiun ĉi no-
mon.

— Kial?

— Ĝi estas longa historio.

— Ĝis la vespero ni havas tempon.

— Ĉu mi estas arestita?

— Io simila. Sidigu kaj rakontu!

Ni sidigis. La pli aĝa eltiris cigarujon,
tamen ene estis nur unu cigaredo. Li
dividis ĝin je du partoj. Unuan duonon
li metis en la cigarujon kaj la duan
ekfumis. Sed eksorbinte du aŭ tri
fojojn, li malbruligis ĝin kaj remetis

* Il premio en la Jubilea Literatura Kon-
kurso 1973 j.



ĝin ĉe la alian. Tiam mi regalis lin. La partizano prenis du cigaredojn, sed mi donis pli multe. Li dankis, ekfumis kaj diris plezure:

— De kiam mi ne fumis luksajn cigaredojn! De kie vi havas ilin?

— El la kelo de la riĉulo.

— Kiu riĉulo!

— Zarko la Cincaro. Servisto mi estas ĉe li.

— Kial oni nomis vin Gvardiulo?

— La pasintan printempon mi iris semi avenon ĉe „Trajanov Pât“. Bone, sed alveninte, kion mi vidas: en la agrokampo de mia mastro paŝtas sin kelkaj ŝafoj. Mi malsupreniĝas de la veturilo kaj iras vidi, kies estas la ŝafoj. Mi alvenas kaj ekvidas Ivan la Flikaĵon — sidas ĉe la pirarbo kaj legas ĵurnalon. La diablo ekfuriozis ĉe mi:

— Flikaĵo, rapide forkonduku la ŝafojn, ĉar la agro estas kotoza kaj la greno difektiĝas!

— Granda afero! La riĉulo fariĝos malriĉulo!

— Granda, malgranda, forkonduku la ŝafojn! — ekkrias mi kaj levas la pikbastonon.

— Riĉula hundo! Gvardiulo! — diris malice Ivan.

Pro la granda kolero falis teren mia cigaredo, farita el malbona tabako. Tion rimarkis Ivan, ĉar tuj li primokis min:

— La kelo de la riĉulo estas plenplena je fabrikvaroj, kaj vi fumis malbonkvalitan tabakon. Stultulo!

Ĉi-tempe proksime preterpasis Mindo la Longa. Li aŭdis nian kverelon kaj rapide disvastigis en la vilaĝo mian novan nomon. Eksciis pri ĝi ankaŭ mia mastro kaj de tempo al tempo donacis al mi bonajn cigaredojn. „Vere, en la kelo io estas“ — diris mi kaj foje, tuj post la forveturo de la riĉulo kaj lia edzino al la urbo, mi eniris la kelon. Por vi mensogo, por mi vero: ene nur de birdo lakto ne estis!

— Ĉu ne estas ankaŭ sanitaraj materialoj? — demandis la pli aĝa par-

tizano.

— Kiaj materialoj, vi diris?

— Kuraciloj, bandaĝoj, vato. . .

— Jes, jes. La filino de la riĉulo estas apotekistino. Jen tio ĉi estas kruco. — Mi levis la manon por krucsigni.

— Lasu, kamarado, ni kredas al vi.

En tiu momento proksime aŭdiĝis kukolo. La malpli aĝa foriris ien, poste revenis. Ili ambaŭ ion ekflustris, kaj la pli aĝa demandis:

-- Kiam forkuris Ivan?

— La pasintan someron mi rikoltis la avenon. Reveninte hejmen, mi ekciis, ke la polico arestis kelkajn komunistojn. Tuj mi iris en la domon de la riĉulo. Li drinkadis kun sia bofilo — poliestro. La poliestro raportadis pri la arestitoj.

— Ankaŭ la Flikaĵon vi devis aresti! — diris kolere mia sinjoro.

— Sed li estas agrarano.

— Stultaĵoj! Li estas membro de la maldekstra agrarana unuiĝo.

— Bone. Mi prenas noton, — konsentis la bofilo kaj vere skribis ion en sia notlibro.

Poste ili ekdormis ĉe la tablo, ĉar multe ili drinkis. La mastrino ordonis, ke mi konduku ilin al la dormoĉambro. Mi faris tion kaj tuj poste iris al Ivan kaj rakontis ĉion al li.

— Mi pensis, ke vi estas riĉula hundo, sed homo vi estas. Dankon, frato! — diris Ivan.

Miaj kunparolintoj klarigis al mi la situacion sur la frontoj kaj ĉe ni. ili parolis simple, sed saĝe, kaj mi ekmiris, de kie ili scias tiom multe. Posttagmeze ili helpis min ŝargi la veturilon per ligno. Ĉe la foriro venis tria. Mi konjektis, ke li gardis proksime. La plej aĝa diris al mi:

— Vi nek vidis nin, nek aŭdis pri ni. Ĉu estas klare?

— Klare estas.

Pasis monato, monato kaj duono. Iun vesperon venis hejmen Ivan. Li difinis la lokon, kien mi devis porti me-



dikamentojn, bandaĝojn, vaton, cigaredojn, sukeron, farunon. La partizanoj donis al mi ankaŭ kaŝnomon — Ognjan. Por ke la polico kaj mia mastro ne komprenu, ke mi estas partizana helpanto, mi devis paroli kontraŭ la komunistoj. Tiu ĉi duobla rolo kostis al mi multe da malagrablaĵoj.

Iun nokton la partizanoj okupis la vilaĝon. Ili forbruligis la arkivon de la komunumo kaj alportis multajn varojn el la kelo de Zarko la Cincaro. Okazis mitingo. Mi rememoras bone, kiel la estro de la partizanoj diris en sia parolado:

— La germana armeo cedas.

— Intence! — mi replikis.

— Kie vi estas, hundo riĉula! — ekkriis Mindo, sed bone, ke Ivan kaptis lin, kaj mi povis forkuri.

Je la Naŭa de Septembro kelkaj partizanoj denove okupis la vilaĝon. Ili arestis la vilaĝestron, la impostiston,

la policanon kaj la Cincaron. De ie aperis Mindo la Longa kaj tuj arestis min. Post du tagoj la partizanoj translokiĝis nin en la urbon. Ĉe la unua pridemando mi vidis la milicestron kaj ne povis rememori, de kie mi konas lin, sed kiam li proksimiĝis pli multe, laŭ la cikatro sur la vango mi komprenis, kiu li estas. Ankaŭ li ekkonis min. Ni ĉirkaŭbrakis nin. Poste li diris ridante:

— Nun mi regalos vin, kamarado Ognjan, per luksaj cigaredoj.

De li mi eksciis, ke Ivan pereis ĝuste antaŭ la Naŭa de Septembro, la unua konatulo el la arbaro kaj la taĉmentestro foriris al la fronto kontraŭ la hitleranoj, kaj neniu alia sciis, ke mi estis kaŝanto de partizanoj.

Jen estas la tuta historio, kamarado. Diru, ĉu tia komplika okazaĵo taŭgas por ĵurnalo?

ORGANIZA VIVO

BONAJ SUKCESOJ DE LA E-INSTRUADO EN SMOLJAN-DISTRIKTO

Fine de septembro 1973 en Pamporovo okazis plenkunsido de DK de BEA en Smoljan kune kun aktivularo. Ĉeestis ankaŭ k-doj Nikola Aleksiev — prezidanto de BEA, Nikola Nikolov — ĝenerala sekretario de Monda Turismo, kaj esperantistoj el Sovetunio, Pollando, Hungario k. a.

Raporton pri la organizita instruado faris Jordan Jordanov — prezidanto de DK de BEA en Smoljan. Li substrekiis, ke dum la pasinta jaro estas farita bona progreso: 21 kursojn partoprenis 398 lernantoj kaj civitanoj, do per 23,4% pli multe ol dum la antaŭpasinta jaro. Plej bonajn rezultojn tiudirekte havas la E-Societo en v. Dospat, kie la laboron gvidas la energia kaj sindona instruisto Emil Ĉirpanski. Bone finiĝis la 3 kursoj en v. Ŝiroka Lâka, kie instruis Esperanton Straŝimir Spasov, S. Kopanova kaj Grigor Kjosev, ankaŭ la kursoj en Smoljan, Ĉepelare, Rudozem, Zlatograd, Madan k. a.


Tre utilaj en la E-instruado estis nia asocia organo „Bulgara Esperantisto“ kaj la organo de MEM „Paco“. La esperantistoj en Dospat abonis ilin centprocente, kaj la ceteraj societoj en la distrikto atingis la planitan kvanton.

En la raporto de Jordanov estis substrekitaj ankaŭ la internaciaj Esperanto-aranĝoj en Smoljan-distrikto: la Internaciaj Someraĵ E-Kursoj, la Ora E-Ferio en septembro kaj la Vintra E-Semajno.

Granda sukceso por la E-movado ne nur en Smoljan-distrikto, sed ankaŭ en la tuta lando estas la fondo de konstanta somera E-lernejo en v. Pisanica. Ĝi estas rezulto de multaj klopodoj, obstino, entuziasmo kaj sindonemo fare de la morala kaj materiala helpo de la Distrikta Komitato de Bulgara Komunista Partio kaj de la Distrikta Popola Soveto.

Por la perfektigo de la junaj esperantistoj kontribuis ankaŭ la interŝanĝo de E-grupoj

K-do N. Aleksiev ĉe la tribuno.



BONA E-KUNVENO EN SUMEN

La kunvenoj de la urba E-Societo „Vekiĝo“ okazas regule ĉiusemajne, lunde vespere, en la Klubejo de la Kulturagantoj (la konstruaĵo de la dramteatro „Vasil Drumev“).

Ekde la komenco de tiu ĉi aŭtuno niaj kunvenoj tre vigligis kaj estas regule vizitataj de 25 geesperantistoj (50% de la membraro). La 1-an de oktobro estis preparita ĵurnalo parolata. Redaktoro estis mia moŝto. Mi disdonis la materialojn al diversaj geesperantistoj. Dum la semajno ili sin pretigis kaj hodiaŭ ni „eldonis“ la unuan numeron por la sezono.

Unue havis la parolon k-do At. Bojaĝiev — prezidanto de la Distrikta E-Komitato, kiu prezentis la ĉefartikolon: „La kantisto de l' Oktobra Revolucio“. Li parolis pri la poezia verkaro de la plej eminenta bulgara proleta poeto Hristo Smirnenski.

K-do Ivan Smokov (fervora longjara aganto en Stanke Dimitrov, nun definitive translokiĝinta en Ŝumen) raportis pri la rubriko „Eksteraj Novaĵoj“. Li parolis pri la kontraŭpopolaj persekutoj de la militista hunto en Ĉilio, pri la morto kaj enterigo de l' eminenta ĉilia poeto Pablo Neruda, pri la preparata mortigo de Luis Korvalan, pri la protestoj en diversaj landoj kontraŭ la faŝisma reĝimo en Ĉilio kaj fine menciis plian nombron de ŝtatoj, kiuj decidis ĉesigi diplomatiajn rilatojn kun Ĉilio.

En la rubriko „Internaj Novaĵoj“ raportis k-dino Rajna Stanĉeva, prezidantino de la Uzina E-Societo „Progreso“. Koncize, sed tre trafe ŝi atentigis pri la okazonta en marto 1974 Tutlanda Konferenco de la Bulgara Komunista Partio, pri la Pakongreso en nia lando, kiu dekoris k-don T. Jivkov per ora medalo „Jolio Kjuri“, (Joliot Curi), pri la herocaj klopodoj de nia popolo plenumi la ekonomiajn planojn kaj en la industrio, kaj en la agrikulturo. La raportantino konkrete menciis membrojn de nia E-societo, kiuj aktive partoprenas en tiu laboro, ekz. Cvjatko Todorov — prezidanto de E-Societo „Vekiĝo“.

La kulturan paĝon prezents k-dino Rajna

Kasabova. Ŝi parolis tre lerte en senriproĉa stilo pri la influo de la bulgara Septembra Ribelo de 1923 j. en la cetera mondo. Por subteni sian tezon ŝi prezentis originalajn materialojn el USSR, Francio, Jugoslavio, Greklando.

Je la fino sekvis la lasta paĝo de la „Ĵurnalo Parolata“. En ĝi temis pri distro. Rakontis spritaĵojn: d-ro J. Jordanov, Dimo Minĉev kaj Vasil Georgiev, kiuj gajnis la simpatiojn de ĉiuj ĉeestantoj.

Post ĉiu rubriko sekvis demandoj, kompletigoj, diskutoj. Lige kun la eventoj en Ĉilio la kunveno decidis sendi telegramon pere de la bulgara Ministerio de Eksteraj Aferoj al UNO por protesti kontraŭ la kruelaĵoj de la militistoj en tiu lando.

En la dua punkto de la tagordo sekvis diversaj sciigoj.

Antaŭ tri jaroj el nia urbo ricevis Esperanto-diplomon por instrurajto k-dino Rajna Stanĉeva. Ĉi-jare en la someraj porinstruistaj E-kursoj en Burgas ricevis diplomojn por instrurajto gek-doĵ Atanas Bojaĝiev kaj Rajna Kasabova.

Nia societo zorgas por la plua perfektigo de siaj membroj en la lingvo kaj organizite ekagas dum la nova lernoĵaro de Esperanto.

Canko Murgin

Infanoj eklernis Esperanton

Laŭ iniciato de la Instruista E-Societo „D-ro L. L. Zamenhof“ en Vraca 6-jaraj infanoj komencis lerni Esperanton en la antaŭlerneja grupo de k-dino Kostova ĉe lernejo „Slavejkov“.

La instruisto Enjo Daskalov instruas Esperanton per speciale por la celo preparitaj bildaj lecionoj. Dum la instruado estas uzataj multaj infanludiloj. La lecionoj okazas dufoje semajne. Dum la tempo, kiam la instruisto ne estas en la lernejo, k-dino Kostova per la helpo de la 6-jara knabineto Kamelija, kiu scipovas Esperanton, ripetadas la materialon.

La infanetoj komencis kanti E-kantojn kaj lerni parkere versaojn.

E. D.

I Smoljan-distrikto kaj Pollando, la partoreno de lernanto-grupoj en E-tendaroj en Hungario k. a.

En la vigla diskutado pri la starigitaj problemoj partoprenis S. Kopanova, V. Ŝterkov, P.

J. Jordanov estas dekorata

Pamporov k. a. el Smoljan-distrikto, K. Konstantinov el Pazarĝik, J. Angelov el Plovdiv, doc. G. Dimov el Varna, Vl. Novak el Pollando, Arpad Szegedi el Hungario, Boris Fjodoroviĉ el USSR k. a. Ili esprimis kontenton pri la laŭdinda laboro de DK de BEA en Smoljan kaj aparte de ĝia prezidanto J. Jordanov.

Eldiron faris ankaŭ k-do N. Aleksiev, kiu substrekkis, ke la laboro de DK de BEA en Smoljan estas ekzemplo por la ceteraj distriktaĵ E-komitatoj, kaj CK de BEA disvastigos ĝian pozitivan sperton tra la tuta lando. Fine li dekoris la bruston de J. Jordanov per la Ora Insigno de BEA kaj premiis lin per ekskurso al eksterlando pro liaj meritoj en la E-movado.

Maria Diĉeva



La 14-an de oktobro 1973 en urbo Kazanlâk oni celebris la 70-jaran jubileon de Esperanto-Societo „Roza Valo“. La solenaĵo okazis en la salono de legejo (Kulturdomo) „Iskra“. Ĉeestis pli ol 500 personoj el Kazanlâk kaj aliaj urboj.

Intereson vekis la bone aranĝita E-ekspozicio en la vestiblo de la legejo. Ĝi montris portretojn de E-pioniroj kaj aktivuloj de „Roza Valo“, nuntempe eldonatajn E-gazetojn kaj revuojn, ricevitaĵajn gratulojn el eksterlando lige kun la jubileo k. a.

Je la 9,30 h. la salono estis jam plenplena. La kurteno leviĝis kaj de la scenejo ekverdis granda portreto de d-ro L. L. Zamenhof kaj slogano „70 jarojn „ROZA VALO““.

Okupis lokojn la membroj de la prezidantaro — E-aktivuloj kaj reprezentantoj de E-societoj el diversaj loĝlokoj.

La solenaĵon malfermis kaj gvidis la sekretario de „Roza Valo“ Ŝinka Geneva. Raporton pri la longjara varia agado de la societo faris ĝia prezidanto Dimo Martinov. Oni aŭskultis lin kun atento kaj intereso.

Gratulparoladojn faris reprezentantoj de: la Urba Komitato de Bulgara Komunista Partio en Kazanlâk, CK de Bulgara E-Asocio — Bojidar Leonov, la distrikta komitato de BEA en Stara Zagora — Jivko Kolev, Ŝumen — Atanas Bojaĝiev, Varna — doc. Georgi Dimov, Ĥaskovo — Georgi Idakiev, Plovdiv — Mihail Danĉev, Sofio — Nano Nanov, Ljubljana, Jugoslavio — s-ino Zofia Elerĵek. Multaj el la gratulantoj prezentis ankaŭ luksajn adresojn kaj aliajn donacojn por la societo-jubileulo. Aparte kortuŝaj estis kvar duopoj da infanoj vestitaj en pitoreskaj naciaj kostumoj, kiuj en la nomo

de BKP, de la Patrolanda Fronto, de Komso-molo kaj de la civitanaro de Kazanlâk prezentis sur la scenejon kvar graciajn korbetojn plenajn je ĉarmaj freŝaj rozoj.

Ŝinka Geneva laŭtleĝis la kolektivajn kaj personajn gratulojn, pli ol 50, ricevitaĵajn el la tuta mondo.

Per unuminuta silento kaj ekstaro oni honoris la memoron de la mortinta antaŭ nelonge E-veterano el Kazanlâk Ivan Zahariev.

Pro multjara esperantisteco kaj meritoj al la E-movado estis dekoritaj per la honora insigno de BEA: Todor Iv. Todorov, Anastasia Baklarova, A. Ganĉev, Ivan Sarafov, Ivan Draganov, M. Edrev k. a.

La solena kunveno akceptis tekston por telegramo al CK de Bulgara Komunista Partio.

Riĉa altnivela belarta programo estis plenumita de dancaj, instrumentaj kaj kantgrupoj el infanoj kaj gejunuoj de Kazanlâk, kies majstreco vekis entuziasmon kaj rikoltis tondrajn aplaŭdojn. La publiko havis la plezuron aŭskulti ankaŭ niajn geaktorojn Belka Beleva kaj Mihail Ĉobanov de la Bulgara Esperanta Teatro. Grupo de 22 lernantoj el v. Enina plenumis „Vivu la stel!“ kaj bulgarajn popolkantojn.

Post la solenaĵo la plimulto de la esperantistoj tagmanĝis kolektive en restoracio. Posttagmeze ili ekskursis al la historia vilaĝo Ŝipka kaj ĝiaj vidindaĵoj. La gastoj forlasis Kazanlâk — la ĉarman urbon de freŝa aero kaj bonodoraj rozoj — kun sento de granda kontenteco pro la varia, vigla kaj rezultoplena agado de E-Societo „Roza Valo“ dum la jardekoj kaj nun.

Rajna Konstantinova

EN E-SOCIETO „PROGRESO“

Lige kun la antaŭstaranta celebrego de sia 10-jara jubileo, E-Societo „Progreso“ en la uzino por ŝarĝaŭtomobiloj „Madara“ en Ŝumen aranĝis konferencon, dediĉitan al la influo de Esperanto en la tekniko.

La konferenco okazis en la uzina Kulturdomo. En la grandan salanon kolektiĝis multe da esperantistoj kaj amikoj de la Internacia Lingvo, teknikistoj, inĝenieroj. Ĉi tie estis ankaŭ la prezidanto de la uzina profesia organizaĵo, la vicsekretario de la uzina junkomunista komitato, la vicestro de la Bazo por Evoluado de la ŝarĝaŭtomobiloj k. a. Sur la scenejo oni

vidis belan sloganon — „Esperanto en servo de la paco, progreso kaj tekniko“, naciajn kaj Esperantajn flagojn. Interesan raporton je temo „Eblecoj por solvo de la lingva problemo en la scienc-teknika informado per Esperanto“ faris inĝ. Bojidar Leonov. La publiko atente aŭskultis liajn tre bone argumentitajn vortojn pri la neceso de pli vasta apliko de Esperanto en la tekniko. Post la raporto oni starigis demandojn.

La prezidanto de Societo „Progreso“ k-dino Rajna Stanĉeva fermis la konferencon, kore dankante al ĉiuj pro ilia partopreno.

Radenko Iliev

ESPERANTA LABORBRIGADO

13 membroj de E-Societo „Libero“ en Ruse formis 1-tagan laborbrigadon, kiu helpis la vinberrikoltadon. La gajnita sumo de 40 levoj ili transdonis al la societa kaso. Tiel ili plenumis du taskojn: helpis la popolan ekonomikon kaj subtenis la E-Societon.

B. K.



VETERANO RAKONTAS

I A M K A J N U N

Rememoroj de Andrej N. Pânčev, rakontitaj antaŭ la solena celebros de 70-jara jubileo de E-Societo „Roza Valo“ en Kazanlâk je la 14 de oktobro 1973.

Je la Unua de Majo 1925, dek tagojn post la atenco en la katedralo „Sankta Nedelja“ en Sofio, kiam la policistoj en mia naskiĝvilaĝo Ŝipka kuris, apenaŭ spirantaj, al la pinarbaro por mallevi la kaŝe starigitajn ruĝajn standardojn, ni—Dančo Iv. Danov, laboristo, kaj mi, instruisto, invitis dekkvin gejunulojn kaj fondis Esperanto-societon, sen permeso de la polico. Dančo estis elektita kiel prezidanto, kaj mi — kiel sekretario, bibliotekisto, kursgvidanto kaj korespondanto.

Ni mendis lernolibrojn, vortarojn, E-verkaĵojn kaj metalan stampilon kun teksto Bulgara Esperantista Societo, Sekcio „Roza Valo“ — Ŝipka. Post dek tagoj alvenis la stampilo kaj pakaĵo da lernolibroj de Atanas D. Atanasov — Ada, tre fama kaj merita aganto de la E-movado en Bulgario kaj eksterlando.

Por ni, ŝipkanoj, estis granda ĝojo, eĉ fiero lerni Esperanton laŭ lernolibro de Ada, ĉar laŭ deveno li estas filo de gepatroj ŝipkanoj, migrintaj iam al Sofio por serĉi pli bonajn vivkondiĉojn. La nomo de Ada impulsis nin.

Je la komenco de oktobro la E-kurso ekfunkciis kun arda entuziasmo.

La lerneja direktoro, kiu mem aliĝis kiel kursano, permesis al ni okupi lernoĉambron kaj provizis nin per hejtado kaj lumigado tute

senpage. La lecionoj okazis dufoje en la semajno. Tago post tago estis rimarkebla progresado.

Paralele kun la lernado la gekursanoj, kun mia helpo komencis korespondi.

Je la fino de la kurso — la 31-an de decembro — ni preparis literatur-muzikan programon. La programo, en Esperanto kaj bulgara lingvo, forte impresis la publikon.

Por mi estis granda plezuro rigardi miajn gekursanojn foliumi la lernolibrojn por legi aŭ serĉi vortojn en la vortaro de Ivan Krestanov. Konstantin Gatev, instruisto, verkis speciale por nia E-societo marŝon kun jena teksto:

*Rozvalanoj, hej ŝipkanoj,
alten nia ekrigard'!
Korojn niajn am' inspiru —
stelo brilas sur standard'.*

*Ni laboru, ni esperu,
nia kredo estu ŝtal',
ke finfine venku nia
esperanta ideal'.*

*Rozvalanoj, hej ŝipkanoj,
alten nia ekrigard'!
Korojn niajn am' inspiru —
stelo brilas sur standard'.*

Mi komponis melodion, kaj ni senescepte komencadis la lecionojn en la kurso per tiu alvokoplena, inspiranta marŝo.

La E-movado estis observata de la lokaj policistoj, kiuj serĉis pretekston interveni kaj malpermesi nian agadon.

La ĉambro, kie ni lernis, troviĝis en la parto. La lerneja servisto ŝmiris la vitrojn de la fenestroj per kalko, por ke la lernantoj ne deflankiĝu dum la lecionoj. Tiel oni tute ne povis vidi, kio okazas en la lernoĉambro, ĝi restis sekreto por ekstere staranta homo.

Sed la okuloj kaj la oreloj de la lokaj policanoj seninterrompe spionis. Ofte ni aŭdis skrapadon sur la kalkumitaj vitroj de la fe-



Membroj-fondintoj de E-Societo „Roza Valo“ — sekcio en v. Ŝipka. Sidantaj (de maldekstre): Totjo Hr. Tâpanov, Donka An. Perĉemlieva, Denka M. Demireva, Stefan Hr. Tâpanov; starantaj (de maldekstre): Minčo P. Doksanliev, Simeon Hr. Karaĝov, Kânju D. Garbadulov, Andrej N. Pânčev, Dančo Iv. Danov, Stefan P. Kacarov, Rusi Hr. Aĝarov kaj Georgi Iv. Danov.



nestroj, preskaŭ sur ĉiu vitro estis lokoj, tra kiuj oni povis vidi en la ĉambron.

La frapbruido de botoj, la iom provoka tusado kaj la skrabado sur la vitroj incitis la kursanojn kaj malhelpis la lernadon. Iun vesperon mi interrompis la instruadon kaj eliris eksteren. Policisto tuj deflankiĝis de la fenestro por maski la spionadon. Ekstere estis frosta vetero, tamen en la ĉambro la forno estis ruĝega.

— Sinjoro policisto, — diris mi, — bonvolu eniri. En la ĉambro estas varmege, pli videble, eniru, mi petas.

— A-a-a. . . Ne gravas, ne gravas, ankaŭ ci tie estas agrable, — diris la policisto kaj proksimiĝis al mi, frapante siajn botojn per vipo. Tra dentoj, aroge timigante min, li diris:

— Hej, instruistaĉo, atentu bone pri via kurso. . . Agu laŭ la cara leĝo, alie — jen la vipo!

Kaj svingante la vipon, li ekpaŝis laŭ la malluma vilaĝa strato.

Alifoj la policisto raŭkvoĉe ekkriis:

— Kiajn stultaĵojn vi babilaĉas en la lerno-ĉambro? Ĉu mankas al vi la bulgara lingvo? . . . Esperanto povas tuj transformiĝi en „tu-pan-too“. . . Ĉu vi konjektas, pri kio temas, ha?

Pri vipo, pri vipooo! . . .

La trafe rimitaj de la policisto vortoj „Esperanto“ kaj „tupanto“ bonhumorigis min kaj mi elkore ekridetis. La verbo „tupam“ en la bulgara lingvo signifas „frapi“, ekzemple „Mi frapas tamburon“ aŭ „Mi frapas per frapilo tapiŝon por ĝin senpolvigi“, tamen en la polic-arestejo „tupam“ signifas „bati“. Tie oni batis ĝis sangoŝpruco, skurĝis senkomplete. La avertaj vortoj de la policisto ne estis simpla kaj sendanĝera afero, ĉar nia E-agado iom post iom iradis rekte al „tupanto“.

Tiel estis iam.

Kaj nun?

Jes, hodiaŭ, la 14-an de oktobro, la Esperanto-Societo „Roza Valo“ en Kazanlâk solene celebras sian 70-an datrevenon sub la protekto de la urbaj komitatoj de Bulgara Komunista Partio, de la Patrolanda Fronto kaj Komsomolo, de la Urba Popola Soveto kaj la plej aŭtoritata kulturinstituto en la urbo — la malnova legejo (kulturdomo) „Iskra“.

Dankon al ili!

Do, antaŭen, paŝo post paŝo, per Esperanto por paco, amikeco kaj kunlaborado inter la popoloj!

Andrej Pânĉev

EL LA AGADO DE LA KLUBO DE ESPERANTISTOJ-FILATELISTOJ EN SOFIO

Je la 24-a de oktobro 1973 en la klubejo de Sofia Filatela Societo, str. Gurko 7, kunvenis unufoje la membroj de la restarigita Klubo de Esperantistoj-Filatelitoj „Amika Rondo“ en Sofio. La kunveno estis tre bone vizitita.

Dank' al la valora morala kaj materiala helpo de l'Asocio de la Bulgaraj Filatelitoj kaj de la Bulgara Esperantista Asocio, „Amika Rondo“ komencis disvolvi bonan agadon. Ĝi jam havas 76 regulajn kaj 26 helpajn (eksterlandajn) membrojn. La Klubo komencis eldoni sian informan bultenon „Kolektanto“.

En la kunveno oni pritraktis la aperintajn 2 numerojn de „Kolektanto“ kaj trovis ilin interesaj kaj variaj.

Lige kun la kreskinta membraro de la Klubo oni decidis pligrandigi la estraron de 3 al 5 personoj. Do, la tuta estraro jam havas la jenan konsiston: prezidanto — Ivan Daskalov,

viceprezidanto — d-ro Boris Nedkov, sekretario — Ljubomir Leviĉarov, kulturkleriganto — Metodij Pânĉev kaj dommaŝtro — Dimitro Biĵev.

Oni akceptis agadplanon, laŭ kiu ĉiuj aŭde (krom la unua de la monato) je la 17 horo en la klubejo okazos kunvenoj. Ekzempla tagordo: 1. Lingvaj ekzercoj; 2. Prelego; 3. Respondo al demandoj; 4. Malgrandaj ekspozicioj, ilustrantaj la prelegojn, k. a.

Al la kunvenoj estas invitataj ankaŭ nemembroj.

La 31-an de oktobro la sekretario de la Klubo de Esperantistoj-Filatelitoj L. Leviĉarov faris prelegon en la kunveno de la tuturba E-Societo „Maksim Gorkij“ je temo „Esperanto en la filatelo“. Li substrekis la personan kaj socian utilon de la kolektado de poŝtmarkoj, aparte de Esperantaj.

L. Leviĉarov

Finiĝis E-kurso por komencantoj, organizita de la Esperantista Sekcio „Justeco“ ĉe Asocio de Bulgaraj Juristoj kaj E-Societo „Maksim Gorkij“ — Sofio, Kursguidinto Violin Oljanov.





IVAN VLADKOV

Ivan Vladkov naskiĝis la 2-an de januaro 1915 en Drjanovo. Li finis realan lernejon en sia urbo, sed daŭ-



rigi sian klerigon en la proksimaj gimnazioj en Veliko Târnovo aŭ Gabrovo li ne povis pro manko de monrimedoj.

Kiel lernanto Vladkov multe legis, verkis rakontojn. Sed la vivo en la malgranda montara urbeto estis monotona, neinteresa. La sciama junulo komencis lerni Esperanton kaj korespondi kun junuloj el Britujo, Belgujo, malproksima Hindujo. Li tiel ekŝatis la lingvon, ke ĉiam promenadis kun sia nedisigebla amiko Ganĉo Donev, ankaŭ esperantisto. Ili interparolis nur en Esperanto, vizitis E-kunvenojn, prenis

la parolon en ili. Ambaŭ amikoj ofte recitis en Esperanto la versaĵojn de Botev kaj Smirnenski, kantis la „Internacion“, „Marsiljezon“. Vladkov kaj liaj geamikoj ne trinkis alkoholajojn, ne fumis tabakon, estis sobraj kaj modelaj en sia vivo. Kun granda entuziasmo ili fondis abstinulan societon en sia lernejo.

Amata loko por ĉiuj estis la legejo „Razvitie“ (Disvolviĝo). Tie ili ofte kolektiĝis. En ilia grupo partoprenis ankaŭ Vârban Genĉev el la proksima fervojstacio Careva Livada, kiu studis en la gimnazio de Veliko Târnovo (pereinta en la kontraŭfaŝista batalo kiel partizano). Spirita gvidanto de la la junularo estis la poeto Atanas Smirnov, sed ĉiama kaj vigla liganto de ĉiuj — Ivan Vladkov.

La esperantistoj, la abstinuloj kaj la legejaj gvidantoj deziris veki la dormantan urbeton. Tial ili komencis viglan klerigan agadon, organizis vesperfestojn kun literaturaj kaj muzikaj programoj, en kiuj regis progresema spirito.

En 1941 Vladkov soldatservis en Veliko Târnovo. Komenciĝis la terura milito inter fâsista Germanio kaj Sovetunio. Ivan Vladkov iris Sofion, kie li estigis kunlaboranto de la famaj antifâsistoj d-ro Aleksandr Peev kaj Emil Popov. Per radio ili sekrete informadis la koncernajn instituciojn de Sovetunio pri la militplanoj de la hitlerana armeo. Sed oni malkovris la grupon. Komenciĝis juĝproceso. Ĉiuj estis terure inkviziciitaj. Milita tribunalo kondamnis la triopon je pafmortigo. La verdikto estis plenumita la 20-an de novembro 1943. Ivan Vladkov tenis la foton de sia filo Rumenciĉo en manoj. La kuraĝaj popolaj filoj rifuzis, ke oni ĉirkaŭbindu iliajn okulojn. Ili deziris renkonti la morton rekte. La timigitaj soldatoj pafis en la piedojn de la herooj.

— Junuloj! — aŭdiĝis la voĉo de Vladkov. — Pafu pli bone! Rekte en la koron!



TRA LA E★ MONDO

KOMUNA BULGARA-HUNGARA ARANĜO

Komisiite de la Komitato de Kulturaj Rilatoj kun Eksterlando, de la 18-a ĝis la 22-a de oktobro 1973 en Budapeŝto estis Georgi Dolapčiev — membro de CK de BEA kaj prezidanto de Sofia Distrikta Komitato de BEA, kaj la konata esperantista paro Belka Beleva kaj Anani Anev el la Bulgara Esperanta Teatro. Tie la Bulgara Kultura Centro (BKC) kaj la Hungara Esperanto-Asocio organizis solenan kunvenon, dediĉitan al la 50-a datreveno de la unua en la mondo amasa perarmila kontraŭfaŝisma Ribelo de Septembro 1923 en Bulgario. La kunveno okazis en la belega ejo de BKC. Ĝin partoprenis pli ol 100 geesperantistoj el Budapeŝto.

Post la enkondukaj vortoj de la vicedirektoro de BKC Svetozar Vasilev kaj la salutvortoj de d-ro Jozefo Mátéffy — prezidanto de HEA, festan prelegon faris Georgi Dolapčiev. Li konigis al la ĉeestantoj la karakteron de la Septembra Ribelo kaj ties influon al la monda batalo kontraŭ la faŝismo.

La prelegon oni aŭskultis kun granda atento kaj evidenta kontento.

La aktora geedza paro Beleva kaj Anev prezentis scenetojn kaj deklamis en Esperanto,

La serĝento, kiu komandis la soldatojn, nerve levis la manon.

— Vivu Bulgario! — ekkriis la triopo. — Vivu Sovetunio! Vivu la komunismo!

Salvo eĥis en la tunelo. La infana fotografiaĵo falis el la manoj de Ivan. Ĉio estis finita.

Nun la societo de la esperantistoj en Drjanovo havas la nomon de la fidela popola filo kaj heroo — Esperantista Societo „Ivan Vladkov“.

Laŭ la libro „Novelo pri Ivan Vladkov“ de Kamen Kalčev, Sofio, 1965.

Kompilis: Ivan Sarafov



akceptitaj tre varme de la publiko. La hungara violonĉelisto András Weber prezentis verkojn de Bach kaj Saint Saens.

Tuj post la solena kunveno la ĉeestantoj estis invititaj al koktejlino en la supra salono de la Centro. La atmosfero altiĝis. Okazis viglaj, amikaj interparoloj, pluaj reciprokaj demandoj kaj klarigoj pri diversaj aferoj.

Laŭ ĝenerala konfeso — kaj fare de BKC, kaj fare de la ĉeestintaj esperantistoj el Budapeŝto, la vespero pasis tre sukcese. La vicedirektoro de la Centro S. Vasilev esprimis bondeziron, ke tiaj komunaj entreprenoj okazu almenaŭ foje en la jaro.

Niaj reprezentantoj realigis ankaŭ aliajn renkontiĝojn. Jam la unuan vesperon de sia restado en Budapeŝto ili estis invititaj de la Junula E-Klubo „Promontor“, kie inter pli ol 40 junaj esperantistoj ili havis eblon paroli pri la motivo de sia vizito en Budapeŝto, pri la Septembra Ribelo de 1923 en Bulgario, pri la E-movado en nia lando ktp. Laŭ deziro de ĉeestantoj Belka Beleva recitis en Esperanto kaj parte en bulgara (laŭ speciala deziro de la publiko aŭdi bulgaran parolon) poemojn de la granda hungara poeto revoluciulo Sándor Petőfi. Niajn reprezentantojn akompanis la kunlaborantino de BKC Eli Mesing. Ŝi ekinteresiĝis pri nia lingvo kaj jam la sekvan tagon d-ro J. Mátéffy donacis al ŝi lernolibron de Esperanto.

Niaj reprezentantoj ĉeestis ankaŭ kunvenon de unu el la esperantistaj societoj de Budapeŝto, kie en la ĉeesto de pli ol 60 personoj denove okazis interesaj interparoloj.

Renkontoj okazis ankaŭ kun estraranoj de HEA kaj la gvidanto de la hungara IFEF-sekcio d-ro István Bácskai.

En la bulgara lernejo en Budapeŝto okazis granda kunveno de la bulgaraj lernantoj kaj instruistoj, kie emociigan kaj tre kortuŝan recitalon de bulgaraj verkistoj kaj poetoj faris Belka Beleva.

La tuta restado de nia esperantista triopo en Budapeŝto estis tre rezultodona rilate al firmigo de la amikaj rilatoj inter la bulgara kaj hungara esperantistaroj, inter niaj du frataj landoj kaj popoloj.

G. D.

La publiko atentis la programon de la bulgaraj amikoj



VESPERO PRI LA SEPTEMBRA RIBELO EN MOSKVO

Ĉar la sovetaj esperantistoj tre bone sentas la varman fratecon de la bulgaraj samideanoj kaj ĝenerale de ĉiuj bulgaroj, la Moskva Internacia Esperanto-Klubo (MIEK) organizis je la 14. 10. 73 solenan vesperon, dediĉitan al la 50-jara datreveno de la Septembra Ribelo de 1923 j.

Interesan raporton pri tiu heroaĵo de la bulgara popolo faris la prezidanto de MIEK d-ro E. T. Salnikov. Malgraŭ tio, ke la Ribelo estis sufokita kun terura krueleco de la bulgaraj faŝistoj, ĝi lasis profundan abismon inter la popolo kaj la faŝismo. En tiu klasbatala ribelo la Bulgara Komunista Partio faris provon kaj ricevis inspiron por fine gajni la venkon per

la helpo de la soveta popolo en la socialisma revolucio de la 9-a de septembro 1944. Kun granda emocio la raportinto rakontis personajn impresojn el siaj renkontigoj kun bulgaraj gesamideanoj dum la 48-a UK de Esperanto en Sofio.

Poste la sekretario de MIEK d-ro K. A. Lavrentjev legis en Esperanta traduko fragmentojn el verkoj de la bulgaraj poetoj Geo Milev, Krum Kjuljajkov, Nikolaj Ĥrelkov k. a., dediĉitajn al la Septembra Ribelo.

La ĉeestantoj atente aŭskultis la vervajn vortojn de la bulgaraj poetoj kaj multe aplaŭdis.

T. K.

LA ESPERANTISTOJ-DELEGITOJ DE LA MOSKVA PACKONGRESO GASTIS EN MIEK

Je la 28-a de oktobro 1973 en la Moskva Internacia Esperanto-Klubo (MIEK) okazis renkontigo de moskvaj esperantistoj kun la esperantistoj-delegitoj de la Tutmonda Kongreso de Pacamaj Fortoj en Moskvo.

La podio de la E-Klubo estis ornamita per pacsloganoj, bildoj, floroj kaj E-emblemoj. La kunvenon gvidis d-ro N. F. Danovskij.

La gastoj-delegitoj de la Packongreso estis invititaj al la tablo de la prezidantaro, kaj k-do S. N. Podkaminer — soveta kongresdelegito el Leningrado, prezentis ilin: Nikola Aleksiev el Bulgario — prezidanto de MEM, Wil. Gilbert el Francio — ĉefredaktoro de „Paco“, ges-roj Cotton el Svislando, s-ino Ingrid Maier el Svedio, D. Bjelanoviĉ kaj D. Nikoliĉ el Jugoslavio.

Ĉiuj prezentitaj gastoj tutkore salutis la ĉeestantojn kaj volonte rakontis pri la fruktodonaj laboroj de la Kongreso kaj pri la Esperanta kaj paca movado en siaj landoj.

K-do Aleksiev anoncis, ke lige kun la 20-jara jubileo de MEM estas premiitaj aktivaj pacagantoj-esperantistoj el Sovetunio per honoraj diplomoj kaj specialaj insignoj: prof. E. A. Bokarev (postmorte), s-ino N. D. Sulje (postmorte), k-do S. N. Podkaminer kaj K. M. Gusev. Al la du lastaj samideanoj tuj estis enmanigitaj la premioj sub viglaj aplaŭdoj de la ĉeestantoj.

Responde k-do K. M. Gusev varme dankis pro la premio kaj legis kelkajn versaĵojn el sia propra verkaro.

S-ino Ingrid Maier interese rakontis proprajn impresojn pri la Packongreso, pri la paca kaj E-movado en Svedio kaj donacis al la biblioteko de MIEK kelkajn E-librojn.

La vicprezidanto de MIEK k-do S. N. Krajnov je la nomo de la ĉeestantoj kaj de la esperantistoj-veteranoj tutkore salutis la gastojn, dankis pro iliaj informoj kaj memore donacis al ili E-librojn kaj broŝurojn.

T. Kulagin

KUN DIVERSLANDAJ AMIKOJ

Dum la lasta semajno de julio survoje al la 58-a UK de Esperanto en Beograd gaste de la bulgaraj esperantistoj estis s-ano Kimiaki Kurita — ĉefredaktoro de „La Verda Kolombo“.

N. Aleksiev enmanigas la premion al K. Gusev

bo“, organo de JPEA — la japana sekcio de MEM. Ĉi-sube ni donas lian artikolon lige kun lia vojaĝo.

Estis mia unuafoja vojaĝo eksterlanden. Unuafoje mi vivis sur fremda tero. Sed ĉiam, kiam mi estis kun esperantistoj, mi tute forgesis, ke mi troviĝas malproksime de mia hejmlando.

Laŭvice mi vizitis Bulgarien, Jugoslavion, Ĉeĥoslovakion, Hungarion, Aŭstrion, Demokratian Germanion kaj Pollandon kaj ĉie mi estis tute varme akceptita kiel reprezentanto de Japana Pacdefenda Esperanto-Asocio (JPEA). Ekzemple en Sofio oni ebligis min paroli antaŭ tricent ĉeestantoj en la ĉambrego de Kultura Domo de Komercaj Laboristoj pri la batalo de la japana popolo por la paco. En Prago mi povis paroli ĉe esperantista kunsido



pri ĉi ne multe priparolata flanko de Japanio, nome, pli mizera flanko kun detruado de la medio kaj popola suferado, montrante diapozitivon, kaj povis paroli tute senkaŝe kun multe da esperantistoj, junaj kaj maljunaj. En Bratislava mi estis oficiale invitita de Slovaka Packonsilantaro kaj intervjuis kun la sekretario de Slovaka Packonsilantaro kaj ĉefredaktoro de la sekcio por klerigado de plenkreskuloj ĉe Radiostacio Bratislava. En Budapeŝto mi povis paroli antaŭ multe da esperantistoj kun diapozitivaj pri du temoj, nome, atombombita Hiroŝima kaj la 18-a Monda Konferenco kontraŭ A- kaj H-bomboj. Ankaŭ en Berlino, Vieno kaj Varsovio mi havis okazon multe paroli kun tiaj esperantistoj.

El tiuj esperantistoj mi permesas al mi nomi nur kelke da personoj, ĉar mi tute ne povas nomi ĉiujn, al kiuj mi devas multe danki.

Unue, mi tre ĝojis vidi k-don N. Aleksiev, nia prezidanto. Mi trovis lin tre sindonema, vigla kaj prudenta homo, plene fidinda kiel nia estro. Estante malnova batalanto, li havas tre rapidan, sed trafan juĝon kaj samtempe tre delikatan zorgemon. Lia varma traktado pri mi ĉiurilate forte min impresis.

Due, min ĝojigis k-do T. Balda, nia ĝenerala sekretario. Malgraŭ sia kormalsano li ĝoje surprizis min, atendante min ĉe la aerhaveno Prago kun kelkaj ĉefaj samideanoj. Pli poste, kiam mi vizitis lian domon, li multe kuraĝigis min kaj intime regalis min per siaj varmaj vortoj.

Trie, mi havis feliĉon renkonti vjetnamajn amikojn k-don Dao Anh Kha kaj k-don Nguyen Ding Phung. En Sofio mi loĝis ĉe en sama ĉambro kun k-do Kha. Mi parolis multe kun ili pri diversaj aferoj inkluzive pri estonta

ebleco de ilia vizito en Japanio. Impresis min ilia kvieto, sed sincera kaj firma sinteno.

El tiuj spertoj mi lernis, kiel universala estas nia deziro por paco, kiel komuna estas nia starbazo kaj kiel sindonemaj estas niaj kunlaborantoj. Por eluzi min por nia komuna celo ili tre prudente preparis ĉion. Se mia vojaĝo iom helpus nian Movadon, tio multe ŝuldiĝas al ilia bona arango kaj preparado.

Mi lernis, ke interkompreniĝo ne okazas nur per lingvo, sed estas nepre necesa ia komuna bazo por tio. Eĉ inter samlingvanoj oni ofte trovas malfacilecon interkompreniĝi, se temas pri politikaj, kulturaj kaj similaj nesimplaj aferoj. Kaj ĉar ĉiuj nacioj naskiĝis, kreskis kaj vivas en tre malsamaj medioj, ĉar ili estas informataj tre malsame, des pli granda estas la malfacilaĵo inter ili.

Sed mi kredas, ke ni venkis ĝin almenaŭ grandparte. Mi parolis kun multe da kamaradoj-esperantistoj kaj ofte min mirigis ilia bona kompreneco. Precipe tio okazis ĉe tiuj esperantistoj, kiuj sindone laboradas por nia komuna celo en siaj propraj landoj, aŭ eĉ tiuj esperantistoj, kiuj multe legas nian komunan organon kaj literaturon. Mi estas tre ĝoja trovi, ke ĝuste MEM donas tian komunan bazon por interkompreniĝo, kaj ke ni ne sekvas „nuran lingvan movadon“, kiu montriĝis nesufiĉa eĉ por „internacia kompreniĝo“.

Fine mi esprimas mian dankon elkoran al tiuj samideanoj, nomitaj kaj ne nomitaj ĉi tie, kiuj oferis multe da tempo por vere samideane regali kaj gastigi min propraloke.

Kimiaki Kurita

El „La Verda Kolombo“, n-ro 27(1973)

KIEL NASKIĜIS PIF

La 6-a Pupteatra Internacia Festivalo (PIF) en Zagreb finiĝis per senkontesta triumfo de la Ŝtata Pupteatro de Plovdiv (Bulgario), kiu rikoltis kaj la unuan fakan premion, kaj la unuan premion de la infanjurio, konsistanta el 43 infanoj de 4 landoj.

Tiun ĉi manifestadon partoprenis ankaŭ profesiaj pupteatroj de Poznań kaj Lublin (Pollando), Budapeŝto (Hungario), Iasi (Rumanio), Niŝ (Jugoslavio). Ĝia arta nivelo estis sufiĉe alta, kvankam eble iom malpli alta ol la pasintjara, jubilea. Laŭ multaj, tamen, ĝi estis tro avangarda. Estas preskaŭ nekredeble, ke tiel bela spektaklo, kiel tiu de la Hungara Ŝtata Pupteatro, preparita helpe de 140 pupoj kaj pure pupeca, pasis preskaŭ nerimarkita, almenaŭ de la ĵurio.

de maldekstre:

D. Bjelanović, S. N. Podkaminer, N. Aleksiev kaj W. Gilbert sur la Ruĝa Placo en Moskvo



Pli ol iam PIF fariĝis ĉi-jare malkonsekvenca. Dum ĉiuj volus ĝin igi tute avangarda kaj „elŝiri ĝin el la ĵugo de Esperanto“, aliaj deziras, ke ĝi fariĝu denove antaŭ ĉio manifestado, destinita ĝojigi la infanojn per pure pupteatraj prezentoj, kaj manifestado, en kiu la pupistoj trovos komunan lingvon kaj sur la scenejo, kaj ekster ĝi ipere de Esperanto.



En la ĝisnunaj PIF-oj partoprenis trideko da pupteatroj el 12 landoj. Tio signifas, ke preskaŭ 500 pupistoj lernis esperantlingvajn spektaklojn kaj pere de ili almenaŭ parte ankaŭ la lingvon mem. Dum „ekstere“ disvolvigas batalo pri la destino de PIF, „interne“, t. e. en la Esperanto-movado, ankoraŭ malmultaj komprenis ĝian signifon. Tial tro malrapide kreskas la nombro de la eksterlandaj spektantoj, kaj estas eble al iuj jam laŭte demandi: „Kial la festivalo okazas en Esperanto?“

Kial? Ĉar PIF estas unu el la plej sukcesaj eksperimentoj sur la vojo al praktika uzado de Esperanto. Ĉar ĝi naskiĝis el la vivo mem tie, kie la kondiĉoj estis la plej maturaj. Antaŭ ses jaroj la Zagreba Studenta E-Klubo decidis organizi internaciajn Kulturajn Feriojn kun la celo enpuŝi pli forte la Internacian Lingvon en la turismon. Por pliintelligi la restadon oni Interkonsentis, ke ĉiu el la feriaj restadoj havu apartan temon (filmo, teatro, pupteatro, kanzono ktp.). Tamen pro nesufiĉa interesiĝo flanke de la esperantistaro la ambicia projekto praktike fiaskis. Eĉ la restado, kies temo devis esti pupteatro, ne povis okazi en Bled, kiel estis antaŭvidite. Sed ĝi okazis en Zagreb. Por surprizo de la organizantoj mem anonciĝis eĉ pluraj profesiaj pupteatroj. La afero vekis tian intereson inter la pupistoj, ke ili ne povis ĉesi sur tiel bona vojo. Iom post iom PIF fariĝis manifestaĵo, agnoskata en la mondo de la pupteatro. Ĝi estas vaste rekonata ankaŭ de la infana publiko el Zagreb kaj ĝiaj ĉirkaŭaĵoj. Tamen ĝi estas pli kaj pli atakata en kelkaj kulturaj medioj, kiuj volus fari el

ĝi ekskluzivan avangardan festivalon, en kiu pupo apenaŭ ankoraŭ ludus rolon. Kaj tiuj samaj ankaŭ komencis ataki la uzon de Esperanto en PIF.

Ni ja kontraŭargumentas, ke tiu solvo estas preferinda por la pupistoj mem, ĉar ili pli bone komprenas la prezentaĵojn de siaj kolegoj (sed ĉi-jare pro la financa streĉado la pupistoj apenaŭ povis ĉeesti la prezentaĵojn de aliaj trupoj) kaj krome havi pli facilajn intertraktojn en Esperanto, ofte interkomprenigante per ĝi eĉ sen vera lernado (vere, sed ankaŭ por tio necesas pli da tempo ol ĉi-jare). Ni parolas pri la ĉeesto de eksterlandaj infanoj (tamen inter ni, ĉu la allogo de dudeko da eksterlandaj kaj dudeko da zagrebaj lernejoj infanoj estas sukceso post sesjara ekzisto?). Ni diras, ke en Zagreb estas pli da personoj, kiuj komprenas Esperanton, ol ekzemple la rumanan lingvon (sed ni ne diras, ke krom la membroj de la organizanta grupo, eĉ ne deko da zagrebaj esperantistoj vidis almenaŭ unu el la prezentaĵoj).

Iam la esperantistoj lanĉis Primoštenon. El nekonata fiŝista vilaĝo ili faris unu el la plej konataj turismaj lokoj de Jugoslavio. Sed ili de tie estas jam preskaŭ forĵetitaj, apenaŭ tolerataj. Esperantistoj kreis ankaŭ PIF-on, ĉi-foje laŭ koncepto realisma, profesia. Ĉu la indiferenteco de la esperantistaj amasoj, la nekomprene de multaj el niaj ceteraj saĝaj aktivuloj, kondukos ĝin al la sama sorto? Ni esperu, ke unu leciono sufiĉas.

R. Imbert

„INTERGAST“ — LOGIGA SERVO DE MONDA TURISMO

Multaj planoj de esperantistoj por veturado eksterlanden ne povas realiĝi pro financaj kaj loĝeaj problemoj. Luado de ĉambro en hotelo estas multekosta kaj eĉ malfacila problemo por multaj esperantistoj, precipe dum ĉefaj turistaj sezonoj.

Multaj esperantistoj povas disponigi ĉambron al eksterlandaj esperantistoj por difinita tempoperiodo, ĉar ili ŝatas akiri novajn amikojn, kun kiuj ili povus praktiki Esperanton.

Por faciligi la loĝadon de turistoj-esperantistoj en eksterlando Monda Turismo starigis loĝigan servon „Intergast“.

Kiamaniere agas „Intergast“?

1. „Intergast“ havas kartotekon de gast-ofertoj.

2. La gast-ofertoj devas enteni minimume jenajn informojn:

a) Preciza adreso kaj nomo de la gastiganto.

b) kion oni disponigas — liton aŭ ĉambron?

c) kiom da personoj samtempe povas gastadi?

d) Maksimuma periodo de gastado.

e) Ĉu estas preferataj iuj gastoj (ekzemple: viroj, virinoj)?

f) Periodo, kiam la oferto validas.

3. La utiligantoj de la servo pagas jarkotizon de 8 internaciaj respondkuponoj aŭ egalvaloran sumon en nacia valuto. Ili plenigas aliĝilon. Individuaj kaj dumvivaj membroj de Monda Turismo pagas du respondkuponojn malpli.

4. La utiligantoj de la servo ricevas



Intergast-legitimilon kaj broŝuron kun gast-ofertoj.

5. La gastonto mem interrilatas kun la personoj, ĉe kiuj li ŝatus gasti. Ili interkonsentas pri ĉio koncernanta la gastadon, inkluzive iujn specialajn demandojn: gvidado, ekskursoj, kontakto kun iuj personoj, kiuj havas saman profesion aŭ interesojn.

6. La gastanto ĉe sia alveno devas montri al sia gastiganto sian pasporton, Intergast-legitimilon, validan por la kurenta jaro, kaj certigilon de la Esperanto-organizo, en kiu li membras, ke li scipovas Esperanton kaj ĝuas bonan reputacion inter siaj kolegoj kaj amikoj.

INTERNACIA KONKURSO POR PRETIGO DE E-PROPAGANDILOJ

La propagando kaj la informado estas tre gravaj por disvastigo de Esperanto. Ni bezonas novajn, modernajn, efikajn, variajn kaj ne tre multekostajn varbilojn por la ĝenerala propagando de Esperanto kaj speciale por la kampanjo „Esperanto en la Turismon“. Pro tio Monda Turismo anoncas konkurson por pretigo de Esperanto-varbiloj: afiŝoj, prospektoj, flugfolioj, vinjetoj, desegnaĵoj, karikaturaj, emblemoj, poŝtkartoj, glumarkoj, etiketoj, insignoj, globkrajonoj, sakoj, ornamteleroj, cindrujoj, alumetujoj, ornamaĵoj k. a.

La konkurson povas partopreni ĉiuj. Estas akceptataj ankaŭ kolektivaj verkoj. Ekzemple esperantisto povas doni ideon, kaj fakulo, kiu ne scipovas Esperanton, povas realigi ĝin.

La konkurso ne estas anonima. Nenia limigo ekzistas pri uzado de materialoj, dimensioj, koloroj kaj lingvo de la farataj konkursaĵoj.

La konkursaĵoj estos ekspoziciitaj dum la 59-a Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazos de la 27 de julio ĝis la 3 de aŭgusto 1974 en Hamburg, FR Germanio.

Jurio, konsistanta el fakuloj kaj estraranoj de Monda Turismo, aljuĝos jenajn premiojn:

7. La gastanto devas havi decan konduton dum la gastado kaj en nenia okazo devas ĝeni aŭ kompromiti la gastiganton kaj ties familianojn.

8. „Intergast“ ne respondecas pri:

a) Eventuala nekoincido inter la publikitaj informoj kaj la efektiva plenumo de la gastado.

b) Problemoj, aperantaj se la gastanto alvenos surloke antaŭ ol ricevi de la ofertdonanto konfirman respondon pri la gastigo.

Dezirantoj aliĝi al la loĝiga servo „Intergast“ sin turnu al Monda Turismo, Servo „Intergast“, PK 45 Sofio-C, Bulgario.

1. Partopreno en la 14-taga ferio „Ora Pola Aŭtuno“.

2. Partopreno en la 10-taga Internacia Naturamika Renkonto, Hungario.

3. Partopreno en la 10-taga „Ora Esperanto-Feriado“ en Bulgario.

4. Partopreno en la Vintra Esperanto-Semajno en Pamporovo, Bulgario.

5. Premioj de Esperanto-organizaĵoj, kiujn ili mem aljuĝos en interkonsento kun la konkursa Jurio.

La aljuĝitajn premiojn oni anoncos dum la Kvara Ĝenerala Kunveno de Monda Turismo, kiu okazos en la kadro de la 59-a UK en Hamburg.

La partoprenantoj devas sendi siajn konkursaĵojn ĝis la 1-a de julio 1974 al D-ro W. Bormann, D-205 Hamburg 80, Schürstr. 26, FR Germanio.

La konkursaĵoj restas propraĵo de Monda Turismo. Nepremiitaj konkursaĵoj povas esti eldonataj nur post konsento de ties aŭtoro.

Ni esperas, ke multaj personoj partoprenos la konkurson. Pli detalajn informojn pri ĝi oni povas peti de la asocio Monda Turismo, PK 45, Sofio-C, Bulgario.

La estraro de Monda Turismo

MI PARTOPRENIS LA 13-AN INFANKONGRESETON

Mi atendis kun grandega senpacience la tagon de forveturo al la 13-a Internacia Infankongreso en Beograd. Unuafoje mi devis veturi al eksterlando sen miaj gepatroj. Sed mi estis en bona kompanio: kun mia amiko Vesko kaj liaj gepatroj — onklino Belka kaj onklo Anani. Dum la veturado al Beograd plej grandan impreson faris al mi la kanjono de Nišava proksime de Niš. Tiun riveron mi estis vidinta en Godeč, tamen ĝi estis tute malgranda, simple rivereto. Sed iom post iom ĝi kreskas kaj en jugoslavia teritorio antaŭ Niš traboras rokoriĉan altaĵon kaj formas pitoreskan kanjonon. Ambaŭflanke de la rivero staras minace grandaj rokoj, similaj al la rokoj de Lakatnik. La kanjono de Nišava tamen estas malpli longa kaj malvasta. Sur unu flanko de la rivero estas la fervojo, kaj sur la alia — moderna internacia ŝoseo. Dum ni veturis per la vagonaro, super niaj kapoj pendis timigaj rokoj. Estas tre interese observi tiun imponan panoramon.

Ĉe la fervojstacio de Beograd ni rimarkis la amatan verdan flageton kaj direktiĝis al ĝi. Poste per aŭtobuso ni facile atingis la kongresejon de la 58-a UK de Esperanto. Tio estis la Domo de la Sindikatoj — en la centro de la urbo. Antaŭ ĝi jam atendis grupo da infanoj el diversaj landoj. Per speciala por ni aŭtobuso post duonhora veturado ni atingis Pionirski grad (Pionir-urbo) en Košutnjak, apud Beograd. Tie la Pavilono de la Internacia Amikeco atendis nin, 31 geknabojn el

9 landoj: Jugos'avio — 8, Italio — 6, Britujo — 5, Bulgario — 3, Danlando — 2, Hungario — 2, Japanio — 2, Usono — 2, Pollando — 1. Kun granda intereso mi deziris vidi miajn samloĝantojn. Kaj vere nia ĉambro estis internacia: bulgaro, italo, anglo, kroato. Inter ni plej bone parolis Esperanton la plej malgranda — la 7-jara italido Paŭlo, ĉar li estas denaska esperantisto. Kun li kaj kun la anglido ni parolis facile ĉiam en Esperanto. Sed mia kroata amiko Bojan estis tute nova esperantisto kaj preferis „krokodili“ kun mi en sia gepatra lingvo.


La tagojn ni pasigis tre amuze kaj utile. Estis ludoj, kantado, banoj, naĝado, ŝakludoj, prezentoj de filmoj ktp. Unu el la plej interesaj estis la Gepatra Tago. Tiam venis gaste niaj gepatroj kaj ni prezentis antaŭ ili riĉan belartan programon. Oni kantis, deklamis, aktoris. Mi kantis „Rozan Valon“. Vesko deklamis „Estas mi esperantisto“ de Julio Baghy. Duope ni prezentis ankaŭ gajajn dialogojn.

Tre interesa por ni estis la konatigo kun Beograd. Aparte mi admiris la panoramon ĉe Kale Megdan — parko kun restaĵoj de iama glora fortikaĵo. Antaŭ la „okuloj“ estis majesta vidaĵo: la kunfluigo de la du grandaj riveroj Danubo kaj Sava. Per aŭtobuso ni vizitis ankaŭ la altaĵon Avala, proksime de Beograd, kun Monumento de la Nekonata Soldato kaj alta televidturo.

Nerimarkite forflugis la tagoj en la Infana Kongreso. Sed mi neniam forgesos ilin. Tiuj tagoj havigis al mi grandan ĝojon kaj plezuron. Ili estis por mi grava Esperanta praktiko. Kaj en mia koro ekflamis ankoraŭ pri forta amo al Esperanto — lingvo de amikeco inter la infanoj de ĉiuj popoloj, inter la homoj en la tuta mondo.

Branimir K. Vălev, lernanto en VI klaso

Branimir kaj Vesko aktoras



LINGVAJ DEMANDOJ

Pri la artikolo „Pledo por Esperanto laŭeble simpla kaj facile komprenebla“

Lige kun la supremenciita artikolo de s-ano A. Lienhardt, aperinta en n-ro 1/1973 de „BE“, s-nino Hella Sauerbrey el GDR sendis al nia redakcio jenan leteron:

Berlin, la 8-an de majo 1973
Estimataj redakcianoj!

Ricevinte de mia bulgara amiko la 1-an numeron de „Bulgara Esperantisto“ de 1973 j., mi tuj atente tralegis ĝin.

Kun aparta intereso mi studis la artikolon de s-ano Albert Lienhardt. Jes, preskaŭ ĉiuj 12 punktoj estas akcepteblaj.

Pri punktoj 4 kaj 7 mi parte konsentas. Punkto 9 ne estas tute kontentiga, same kiel la tuta akuzativa problemo mem. Unu-

flanke, multaj esperantistoj jam al kutimiĝis uzi la akuzativon *ne nur* ĉe rektaj objektoj kaj por indiki direkton, *sed ankaŭ* diversflanke, ekzemple: *helpu min, mi dankas vin, memoru tion ktp.*

Aliflanke, ĉiam denove la komencantoj stumblas ĝuste pri tiaj ekzemploj. Do, la propono de s-ano A. L. estas pripensinda.

La tuta „Bulgara Esperantisto“ plaĉas al mi! Tion sincere mi opinias.

Hella Sauerbrey

TRA LA GAZETARO

En j. „Rabotničesko Delo“ (28. IV. 1973), organo de CK de Bulgara Komunista Partio: artikolo de Dimitr Bošnjakov, bibliografo — „La poezio de Bagrjana tra la mondo“ — pri la verkoj de nia eminenta poetino Elisaveta Bagrjana, tradukitaj en fremdajn lingvojn (28!). La unua traduko de ŝia verko estas en Esperanto (1926 j.).

En la sama ĵurnalo (24. VII. 1973): informo „Esperantista kongreso“ — pri la kongreso de TEJO en Sarajevo. Sciigas la korespondanto de Bulgara Telegrafa Agentejo en Beograd.

En la sama ĵurnalo (19. VIII. 1973): informo „Renkontiĝo de l'amikeco“ — pri granda kunveno en u. Burgas, organizita de la lokaj esperantistoj en kunlaboro kun aliaj neesperantistaj organizaĵoj, omaĝe al la nacia kaj monda kongresoj de la paco. Prelegis Kunĉo Vălev, estrarano de BEA. Salutis esperantistoj el 6 landoj.

En la sama ĵurnalo (22. VIII. 1973 j.): artikolo de Nikola Aleksiev, prezidanto de BEA kaj de MEM, pri la 58-a UK de Esperanto en Beograd.

En la monata „Informa Bulteno“, organo de la Nacia Bulgara Komitato por Eŭropa Sekureco kaj Kunlaboro, n-roj 5—6 de 1973 j. oni mencias pri kunlaboro kun CK de BEA kaj la lokaj E-societoj.

En la ĉiutaga j. „Oteĉestven Glas“, Plovdiv (5. VI. 1973): granda informo „Monumento de d-ro Zamenhof en Pollando“ lige kun la inaŭguro de la monumento de Zamenhof en Bialystok. Estas donita ankaŭ foto de

la monumento.

En la sama ĵurnalo (8. IX. 1973): informo „Internacia esperantista renkontiĝo“ — pri la tritaga Esperanto-aranĝo en Plovdiv okaze de la Internacia Specimena Foiro en tiu ĉi urbo.

En j. „Narodna Mladeŝ“ (7. VI. 1973), organo de CK de Komsomolo: granda informo pri la agado de la unua en nia lando Lernanta E-Societo „Verda Raketo“ en u. Vraca — de la loka korespondanto de la ĵurnalo.

En j. „Zarja na Komunizma“ — u. Loveĉ (12. VI. 1973): informo de Asen Matev pri kunveno, organizita kun neesperantistaj organizaĵoj omaĝe al la monda packongreso en Moskvo.

En j. „Zname na Komunizma“ — u. Târgoviște (23. VI. 1973) sub titolo „Je servo de la paco kaj la amikeco inter la popoloj“ — intervjuo kun Nikola Aleksiev, prezidanto de BEA kaj de MEM, pri E-Recitalo de Bulgara Revolucia Poezio kaj Kanto en Târgoviște, dediĉita al la 50-a datreveno de la Septembra Ribelo kaj la okazonta en Moskvo monda kongreso de la pacobatalantoj.

En j. „Ĉernomorski Front“ — u. Burgas (18. VII. 1973): informo „Novaj sukcesoj de la esperantistoj en Burgas“ de K. Bjandov — pri la novekreita esperantista koruso en la urbo.

En la ĉiutaga j. „Veĉerni Novini“ (21. VIII. 1973): informo de K. Androvski pri la agado de la Lernanta E-Societo „Verda Raketo“ en u. Vraca.

En la sama ĵurnalo (28. VII. 1973): informo pri la nacia konferenco de la Bulgara Junularo en u. Koprivŝtica.

En j. „Rodopski Ustrem“ — u. Smoljan (2. X. 1973): informo „Firmapaŝe en la movado esperantista“ de Maria Diĉeva — pri la distrikta

Redakta Komitato: Kunĉo VĂLEV (ĉefredaktoro), Marin BĂCEV, Asen GRIGOROV, Nenko JONKOV, Krăstju KARUCIN, Ivan SARAFOV, Angel TODOROV, Stefka HRISTOVA.

Korektis: Vasja Petrova

Sofio, poŝtkesto 66

Tel. 31-00-29

E-renkontiĝo en la somerrestadejo Pamporovo omaĝe al la 50-jara jubileo de la Septembra Ribelo (1923 j.) de nia popolo.

En j. „Septemvrijsko Zname“ — u. Pazarĝik (9. X. 1973): informo de K. Genčev pri nova Esperanto-kurso en la urbo.

En la sama ĵurnalo (18. X. 1973): artikolo „Esperanto — ŝatata lingvo de l'junularo“ de Ĥristo Zaĥov — pri la E-movado en u. Velingrad en la pasinteco kaj nun. En la sama numero: informo de Kostadin Genčev pri renkontiĝo kun la E-veterano Kosta Konstantinov el Pazarĝik.

En la sama ĵurnalo (23. X. 1973): informo de Kostadin Genčev pri vespero, dediĉita al Pollando, organizita de E-Societo „Radio“ en Pazarĝik kune kun neesperantistaj organizaĵoj.

En j. „Iskra“ — u. Kazanlāk (13. X. 1973): dediĉita tuta paĝo al la 70-jara jubileo de la loka E-Societo „Roza Valo“ kun artikoloj de Dimo Martinov, Denčo Barov, versaĵo de Ivan Zaĥariev kaj fotoj pri la agado de la Societo.

En la sama ĵurnalo (20. X. 1973): informo

pri la solena celebrego de la 70-jara jubileo de E-Societo „Roza Valo“.

* * *

En la libro „La revolucia virinmovado en Bulgario“ de Zdravka Vodeničarova kaj Nevena Popova, eldonita de Libroeldonejo de Patrolanda Fronto en 1973 j. (300-paĝa), oni parolas duloke pri Esperanto.

Sur paĝo 144, rakontante pri la popola heroino Vela Piskova, pereinta kun pafilo enmane en la batalo kontraŭ la faŝista polico en 1925 j., oni substrekas, ke por vivteni sian familion ŝi donis lecionojn de matematiko, violono kaj Esperanto.

Sur paĝo 158 estas priskribita la 8-marta virinkunveno en la klubejo de Bulgara Komunista Partio sur str. Pozitano (Sofio) en 1931 j. Inter la oratoroj estis ankaŭ konstrulaboristo el Aŭstralio, kiu rakontis en Esperanto pri la vivo kaj la batalo de la virinoj laboristinoj en tiu lando.

DEZIRAS KORESPONDI

Ĉeĥoslovakio

Hana Oravcová Zov — 15 900 Velká Chuchle, Praha 5 (21-jara ĉevalrajdistino — kun bulgaroj pri ĉt).

Josef Pařízek — CS-79601 Prostějov, str. Přezinová 22 (lernejestro — interŝanĝas kolorajn bk filatele afankitajn kaj esperantajjn kun ĉt).

Hebková Helena — 50002, Hladeč Králové 2, Chelčického 1240 (20-jara stud. — pri lingvoj, literaturo, muziko).

Polický Rostislav — 51701 Tynište n. O. Sokolska 795 (16-jara lernanto — pri teniso, motorismo, lingvoj).

Rehaková Marta — 2801 Trstená, tř. Dukelských hrdinů 342 (19-jara studentino — kun ĉt pri ĉt).

Kušnier Jozef — 2744 Turdošín, sídl. Medvedzie 117/3 (26-jara instruisto de matematiko kaj fiziko — pri demandoj el siaj fakoj, pri lingvoj, turismo, fotoarto k. a.).

Najdková Olga — 35001 Cheb, U školního Statku (55-jara juristino — pri ĉt).

Purkrabková Marie — 38716 Vlenice, Kálenice 16 (20-jara studentino — lingvoj, instruado).

Salajková Jaroslava — 3910 Sezimovo Usti, Gottwaldova 50 (21-jara oficistino — pri literaturo, vojaĝoj, foto).

Strnska Hana — 33902 Kratovy, Koldinova 454/11 (40-jara teknikistino — pri ĉt).

Vejskalova Jitka — 36000 Karlovy Vary, Vitežna 63 (30-jara instruistino — pri muziko, literaturo, lingvoj, dancoj, k. a.).

Ing. Vik Miroslav — 43401 Most, Gottwaldova 36 (38-jara — pri numizmatiko).

Zezelkova Eva — 10600 Praha 10, Mečíkova 2892 (18-jara studentino — pri motorismo, dancoj, moderna muziko).

GDR

Du fratinoj, 9-jaraj lernantinoj, dez. korespondi per bk kun gelernantoj el ĉl. Adreso: Andrea Winter kaj Susanne Winter — 3014 Magdeburg, Braunschweigerstr. 71

Pollando

Irena Jagodynska — Dłzecz Maly, pow. Kentrzyn, 11-432 Lankiejmy (20-jara — pri sporto, turismo, libroj, muziko, dancoj).

Alice Depta — 43-100 Tychy, 61/8 B. Bieruta St.

Wojtan Piotr — ul. Grazyny 16/36, 20-605 Lublin, L. S. M. (17-jara lernanto — pri bk, sporto).

Maria Serafin — Gdansk 6, ul. Lendaicena 5 b/4, 80-264 (20-jara studentino de medicino — bk, gram. diskoj).

Sovetunio

Estonaj novaj esperantistoj dez. korespondi per bk, interŝanĝi pm, almet-etikedojn, gram. diskojn. Skribu al:

Justa Manueraa — str. Pollu 7, Viljandi, Estonio (oficistino).

Erik Orgo — str. Vaksali 3-a 6, Viljandi Estonio (lernanto de 8-a klaso).

Toivo Vilumaa — str. Kingissepa 33-5, Viljandi, Estonio (lernanto de la 8-a klaso).

Urve Poder — str. Mäe 3-3, Viljandi, Estonio (lernanto de 9-a klaso).

Ülle Okmees — str. Ugala 5, Viljandi, Estonio (lernantino de 10-a klaso).